



En la dua mondmilito slovenoj estis kondamnitaj al la morto pro tio, ke ili troviĝis simple ĝene sur la vojo de la ideo pri la granda germana ŝtato de Baltiko ĝis Adriatiko. Hitler volis ĝin realigi, kaj la slovenojn li decidis disloĝigi for el la „borda ŝtato” (Kuestenland) kaj la reston asimili. Jam en la unuaj tagoj de la okupacio tio komenciĝis tre draste kaj, ĉar la plano estis evidenta, slovenoj komencis jam en la unua monato organizi armitan reziston. Tio poste evoluis al grava rezisto kun kelkdek mil da partizanaj batalantoj, kaj militistaj misioj ĉe aliancaj armeoj. Organizita loka mem-administrado ankaŭ evoluis sur la tiel nomata liberigita teritorio kun multnombraj kvazaŭ ŝatataj institucioj, inkluzive speco de parlamenton kun la propra mono, radio, eĉ teatro (krom la aktualaj teatraĵoj ili ludis eĉ tekston de Moliere), kaj scienca instituto. La vivo sur sub-alpa respektive nord-mediteranea krucvoja regiono denove montriĝis eksterordinare danĝera, kaj tial ankaŭ la gerila milito ĉi tie estis des pli grava pro la avancado de la aliancaj armeoj. Kompreneble, la viktimoj inter la loĝantaro estis multegaj. Centojn oni mortpafis kaj pendumis por timigi la aliajn kiel ostaĝojn. Kelkdek mil pereis, parte en la civitana milito kiun la okupintoj tre lerte manipulis, kaj tre multegaj en koncentrejoj.

En la nova, respublikigita Jugoslavio, slovenoj fariĝis laŭ ilia statuso memstaraj (kun la escepto de armeaj, doganaj kaj ŝtatfinancaj aferoj). Ili kompletigis sian reton de naciaj institucioj, kaj pli ampleksigis la universitaton. Sed, post la morto de Tito, la ŝtato sinkis en koruptemon kaj rigidecon, kaj rapidege kreskis la grandserba unitarismo. Pro tio, la evoluo ĉiam pli regresis. En la jaroj 1990 kaj 1991 Jugoslavio disfalis, kaj en junio 1991 Slovenio mem sendependiĝis kiel memstara, suverena ŝtato, kaj rapidege membriĝis al internaciaj institucioj.



Flago de Slovenio. Dankon al la **World Factbook**.

La nuntempa Slovenio jam venkis la ĉefajn problemojn de landoj en transira periodo; la nacia enspezo denove kreskas, ankaŭ la senlaboreco, kiun ĝi antaŭe praktike ne konis, kaj kun proksimume 15% nun denove komencas malgrandiĝi.

La tolero kiel nacia valuto estas stabila, la jara inflacio malrapide falas al la nivelo sub 20% jare (el la lasta jugoslavia fazo en kiu ĝi estis kelkmila), kaj la devizaj rezervoj kun 2,5 miliardoj da dolaroj estas eĉ iom tro grandaj. Multaj ekonomiaj branĉoj, speciale tiuj, kiuj postulas multe da persona kaj intelekta laboro ree prosperas, kaj la unuan fojon post multaj jaroj la kresko de uzita energio estas pli malrapida ol la kresko de la nacia brutto-produkto.

Revigliĝis ankaŭ la turismo, kiu havas en la slovena spaco vere grandajn ŝancojn kun la multnombraj, ankaŭ eksterlande famaj termofontaj akvaj feriejoj (Radenci, Rogaška Slatina, Topolščica, Olimlje, Čatež) aŭ kun la eksterordinare valoraj 80.000 hektaroj da ŝirmita alpa spaco kun la netuŝita naturo (Nacia Parko de Triglav), kun grandegaj ĉasarbaroj, kun plej ofte puraj riveroj por fiŝkaptado kaj remado. „La vera mondo je la suna flanko de Alpoj” estas aparte alloga por vag-

turismo, ĉar ĝin trairas du eŭropaj piediraj linioj: E6 kaj E7. Entute tra Slovenio pasas montaraj piedmarŝaj signitaj vojetoj en la longo de preskaŭ 10,000 kilometroj. Se iu trovas ĉi tiun nombron troigita, tiu konsideru ke la Montgrimpanta Ligo de Slovenio kiel asocio de montaraj vagantoj enhavas 100,000 membrojn, aŭ 5% de la tuta loĝantaro, kaj ke ĝi prizorgas 150 proprajn domojn.

Simile ankaŭ estas en la vintro: slovenaj alp-skiistoj troviĝas en la monda pinto de tiu sporto, sur la fama Planica, kie naskiĝis skiflugoj. Flugis homo unu fojon pli ol 100 metrojn.

Kaj jen ankoraŭ kelkaj ilustrigaj kaj aparte atrakciaj detaloj:

- En Slovenio troviĝas 10 konstantaj profesiaj teatroj, el tio du operejoj, 4 profesiaj sinfoniaj orkestroj, 112 blovinstrumentaj orkestroj, kaj ĉirkaŭ 1500 kantkorusoj de diverstipa konsisto. Kiel, laŭ silenta memkonvinko, ĉiu sloveno almenaŭ unufoje en la vivo devas grimpi sur Triglavon, same tiel li devas foje kanti en iu koruso. Specialeco estas popol-amuzaj orkestroj (ĉirkaŭ 300), kiuj muzikas polkajn kaj valsojn laŭ la stilo de la famaj Avsenikoj, familianoj de Slavko Avsenik. Ili konas la germanlingvan teritorion kiel „Oberkrain” (supra Krajnsko) kaj oni konsideras ilin inventintoj de tiu speco de muziko. Ili vendas nur en Germanio pli ol 40 milionojn da muzik-diskoj.
- La plej granda kulturdomo estas Cankarjev Dom en Ljubljana kun multnombraj salonoj, inter kiuj la plej granda akceptas 2000 personojn. En Maribor tia domo estas la Maribora teatro, kiu ja ankoraŭ ne estas komplete renovigita, sed indas vidi ties kasan kaj ĉefan salonojn.
- La plej grava desegnoarta aranĝo estas la grafika bienalo en Ljubljana, unu el la plej gravaj de tiuj manifestaĵoj en la mondo.
- En du universitatoj, el kiuj unu estas en Maribor, studas ĉirkaŭ 30.000 studentoj.

— verkis Fani Riznar, Ljubljana, Slovenio

## SLOVENOJ EN KANADO

Evidente, Slovenoj troviĝas ne nur en Slovenio, kaj laŭ lastatempaj taksoj loĝas eble 30,000 ĝis 40,000 sloven-devenuloj en Kanado. La plejparto da enmigrantoj el Slovenio alvenis en Kanado dum tri periodoj: 1920-39, 1947-51, kaj 1951-70. La unua kaj tria grupoj venis plejparte pro ekonomiaj motivoj, la dua pro politikaj. Antaŭ 1920 la malmultaj slovenaj enmigrantoj alvenis tra Usono. Tiuj, kiuj alvenis dum la 1970-aj kaj 1980-aj jaroj ĝuis pli facilajn spertojn. Multaj havis konatulojn kiuj povis helpi ilin. Ankaŭ, pro la fakto ke la jugoslava registaro ne plu malpermesis elmigradon, multaj venis laŭleĝe kaj rajtis iam ajn viziti la hejmlandon. Ĉi tiu grupo estis pli bone edukita kaj povis trovi laborpostenojn kiel lertaj metiistoj, multe bezonataj en Kanado. La plejmulto restis en Ontario, kie sampatrujanoj helpis al ili trovi laboron en fabrikoj kaj en la konstruad-komerco.

Oni notas en la retpaĝaro „la sloveno” <[www.theslovenian.com](http://www.theslovenian.com)>, ke slovenoj fieras pro sia laboremo. Kvankam ili komencis en Kanado kiel man-laboristoj, ministoj kaj fervojaj laboristoj, ili sukcesis subteni la familiojn kaj aĉeti domojn. Kun la kresko de komunumoj, aparte en Toronto, evoluis ekonomia infrastrukturo. La plejparto de la slovenaj enmigrintoj, eĉ universitataj diplomitoj, devis komenci je la malsupro en Kanado. Tiuj, kiuj sukcesis komerce aŭ profesie restis ligitaj al la sampatrujanoj. En komunuma vivo, oni malofte diferencigas laŭ klaso. Oni komprenas ke tiuj, kiuj sukcesas, povas kontribui monon, profesiajn servicojn kaj volontulajn agadojn.

Socia vivo estas parto de la slovena kulturo. En plejmultaj urbetoj, unusola klubo servis la tieajn slovenojn. Tamen, kiam disvastiĝinta komunumo evoluis post 1945, pliaj asocioj aperis, ekzemple politikaj asocioj, kaj la unua paroĥo. Kelkaj novaj organizaĵoj fondiĝis, aparte en Toronto, pro la politika situacio dum la fruaj 1990-aj jaroj en Slovenio. La „Kanadski slovenski kongreso” (kanada slovena kongreso), fondita en 1990, aliĝis al la Monda Slovena Kongreso, establita en 1991. Ĝi celas unuigi slovenojn en Kanado kaj ĉirkaŭ la mondo por defendi la rajtojn de slovenoj enlande kaj eksterlande, kaj antaŭenigi amikecon inter Kanado kaj Slovenio.

La plejmulto da slovenoj estas rom-katolikoj. La preĝejoj en Kanado daŭrigas festajn ligojn kun Slovenio. Episkopoj de la patrujo ofte vizitas Kanadon, kune kun kulturaj grupoj el Slovenio. La rom-katolika eklezio prezentas tradiciajn slovenajn valorojn kaj ritarojn, kaj donas komunuman subtenon same kiel slovenaj lernejoj, kreditbankoj, skolto-grupoj, ĥoroj kaj junular-grupoj. Kelkaj organizaĵoj ricevas financan subtenon de la landa aŭ provincaj registaroj por subteni sloven-lingvajn lernejojn aŭ aliajn apartajn projektojn, sed la plejparto subtenas per si mem la propran etnan komunumon. Sociaj kluboj provizas etan patrujon ekster la hejmo, kie enmigrintoj kaj iliaj posteuloj povas renkonti parencojn kaj amikojn, aparte dum la semajnfino, por babili en la gepatra lingvo, manĝi konatajn manĝaĵojn, kaj danci laŭ la plej ŝatata muziko.

Diversaj sloven-devenuloj jam famiĝis en Kanado. Ekzemple, Walter Ostanek, filo de slovenaj enmigrintoj, fariĝis reĝo de polka-muziko en Kanado. Aloysius Matthew Kardinalo Ambrozic estas la konservativa rom-katolika ĉefepiskopo de Toronto. Tina Srebotnjak estas bone konata televida kaj radia ĵurnalistino. Inter multaj, kiuj famiĝis kiel kanadaj sportistoj estas iama mond-ĉampiono pri glitkurado, Elvis Stojko.

Oni diras ke iu ajn, kiu devenas de Slovenio devus elfosi la propran historion, ĉar estas multaj slovenoj kiuj volonte dividas kun ili pli da informo.

— via redaktoro